

La heroo vivo de Henri Dunant

Claude Gacond, 96-a radioprelego, 1964.09.30 & 10.03

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas Claude Gacond.

Henri Dunant. Jen nomo monde konata. Nomo identigita al bela blankbarba maljunulo honorata de la unua Nobel-pacpremio. Nomo ankaŭ en rilato kun la Ruĝa Kruco.

Sed ĉu oni vere konas la vivon de tiu homo ? Oni eble scias, ke li estis ĝenevano, ke lin famigis lia verko **Rememoro pri Solferino**, ke dank'al tiu libro estis fondita la Ruĝa Kruco. Oni aŭdis eble, ke Henri Dunant konis la mizeron.

Ĉu la protestantoj scias, ke tiu ĝenevano instigis samreligianojn fondi la **Junularan Kristanan Unuiĝon** ? Ĉu la homaranoj konscias pri la ekzakta rolo de la penso de Henri Dunant en la diskonigo de ideoj favoraj al pli homeca mondo ? Ĉu la svisoj komprenas la favoran influon de tiu penso por la protekto de sia landeto ? Kaj la esperantistoj, ĉu ili ĉiam perceptas la influopovon de solulo sur la evoluon de la homaro, kiam tiu homo havas neŝanceleblan memfidon kaj metis sian vivon je la servo de la vero ?

Henri Dunant. Ni provos aperti la vualon de la forgesemo por malkovri la sekreton de lia fido en la vivo, fido kiu movis montojn de egoismo kaj patriotismaj antaŭjuĝoj. Ni provos ankaŭ lumigi la dramon de vivo, kiu sciis, kio estas ĵaluzo kaj mizero.

Kiel estis la spirita atmosfero, kiam Henri Dunant infanis ? La respondo al tiu demando lumigos la karakteron de nia heroo.

En la komenco de la pasinta jarcento Ĝenevo, urbo dudekmililoĝantara, ludis en la mondo enorman rolon. De la dekseca jarcento ĝi ne ĉesis laŭte prediki kun la kalvinista kredo noblajn idealojn, kiel la demokratian egalecon, la universalan balotadon, la rajton de ĉiuj al la kulturo kaj la rajton de la homoj al vera aŭtonomeco.

Povas esti, ke la ĝeneva pastoraro ne ĉiam klare proklamis tiujn civitanajn rajtojn. Povas esti, ke la urbestroj ne ĉiam facile akceptis plenumi la devojn, kiuj rezultas el tiu koncepto de la homo. Sed tamen konstante en la historio de tiu urbo kuraĝaj voĉoj aŭdiĝis por defendi tiujn ideojn. Kelkfoje ilia alvoko estis tiom universala kaj atendata, ke ĝi influis ne nur la destinton de la lemana urbeto, sed eĉ la tutan mondon.

La voĉo de Kalvino apenaŭ silentiĝis, ke tiu de Jean-Jacques Rousseau aŭdiĝas. Li provas defendi la morojn kaj kutimojn de sia urbo, sed liaj diroj ne plaĉas al la ortodoksaj protestantoj, nek al Voltaire, kiu instaliĝis sur la limo inter Ĝenevo kaj Francujo. Tiu konflikto ne malhelpas la horloĝistaron de la kvartalo Saint-Gervais sin entuziasmigi por la ideoj de ambaŭ verkistoj.

En tiu urbeto oni multe disputas por ideoj. La urbo estas dividita en kvartalojn. En la alta kvartalo, kie ĉefe loĝas patriciaj familioj, oni defendas la tradicion protestantismon kontraŭ la novaj ideoj kaj ankaŭ defendas la privilegiojn de la regantaj familioj ; oni estas aristokratema, kvankam oni predikas ĝis ekstremoj de la mondo demokratian kristanismon.

La bankoj kaj la komercistoj okupas la malaltan kvartalon. Tie la financo estas la ĉefa religio, kaj la scienco kaj la novaj ideoj okupas tiun publikon de aferistoj. La religio ja ankaŭ okupas ilian penson, sed religio jam malpli kalvinista, kie la sektoj ekfloras. Tiuj komercistoj ĵaluzas la loĝantojn de la alta kvartalo kaj provas per demokratiaj argumentoj rabi al ili parton de la povo, kvankam ili timas la loĝantaron de tria kvartalo nomata Saint-Gervais, tiu kvartalo, kie laboras la horloĝistoj, homoj, kiuj dum sia trankvila laboro havas la tempon repensi la dimanĉan predikon kaj la kritikatajn verkojn de Rousseau kaj Voltaire.

La religia sinteno en tiu laboristaro tre diferencas de tiu de la aristokratema pastoraro. Rousseau, kiu estas de la kvartalo Saint-Gervais, ĝin bone esprimis per la buŝo de la **savoja**

La heroa vivo de Henri Dunant

Claude Gacond, 96-a radioprelego, 1964.09.30 & 10.03

vikario. Pro tio lia verko **Emilio** estas ofte laŭtlegata de knabino aŭ malriĉa studanto por rompi la silenton, kiu regas en la horloĝistaj laborejoj. Oni eĉ povas diri, ke baldaŭ en ĉiu laborejo aktivus horloĝistoj, kiuj estas veraj fakuloj pri la verkaro de Jean-Jacques Rousseau. Kiam Henri Dunant estis infano, li certe renkontis kelkajn el ili, kiuj kapablis reciti longajn ĉapitrojn el la **Socia Kontrakto**, **Nova Heloizo** aŭ **Emilio**. En la aliaj kvartaloj, almenaŭ publike, oni esprimis sian malŝaton kontraŭ tiuj verkoj.

Do dum pastoroj provas defendi la oficialan kaj ofte ne tre tolereman kredaron, en la kvartalo Saint-Gervais oni meditas la dirojn de Rousseau. Aŭskultu kelkajn el ili :

Mia amiko, vidu la spektaklon de la naturo, aŭskultu la internan voĉon. Ĉu io ne jam diris ĉion al niaj okuloj, al nia konscienco kaj al nia juĝkapablo ? Kion pli la homoj diros ?... Kiom da homoj inter Dio kaj mi !... Dio faru, ke neniam mi prediku al la homoj la kruelan dogmon de la netoleremo, ke neniam mi konduku ilin malami sian proksimulon dirante al ili : « Ekster la Eklezio, nenia savo ! »

La asertoj de Rousseau estis ofte nebulaj. Ili pro tio vekis eterne rekomencantajn diskutojn, kies rolo estis por tiu laboristaro speco de filozofia lernejo. Ofte tiuj asertoj kuraĝigis al ribelo kontraŭ la ekzistantaj leĝoj. Pro tio oni registris dum la infaneco de Henri Dunant preskaŭ ĉiujare unu ribelon kontraŭ la reganta klaso, kiu loĝis en la alta kvartalo.

La homo naskiĝis libera, kaj ĉie li estas katenata... legis tiuj horloĝistoj. Kaj jen ĉu ne alvoko al ribelo : Tiom longe kiam popolo estas devigata obei, kiam ĝi obeas, ĝi agas taŭge ; tuj kiam ĝi povas forskui la jugon kaj kiam ĝi ĝin forskuas, ĝi agas ankoraŭ pli taŭge...

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj. Ni salutas sinjoron Gaston Vidal, en Clermont-Ferrand (Francio), kiel unuan petanton de tiu verketo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-